# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Julio : 2  2022

## EŬTANAZIO AŬ EFEKTIVIGO DE JUSTICO KIO PLEJE GRAVAS?

Dum la lastaj semajnoj, la hispana justico ĉeestas grandan debaton inter la rajto apliki eŭtanazion kaj tiu pri la efektivigo de justico okaze de jura proceso. La diskuto devenas de la jena kazo.

La pasintan monaton decembron, eksa laboristo en sekurec-kompanio, venĝ-avide, atakis la sidejon de la firmao kun paf-armilo. Dum la atako, la eks-laboristo vundis aliajn kunulojn, feliĉe neniu el ili mortis. Kiam policistoj alvenis en la lokon, okazis pafado. Kelkaj policistoj restis vunditaj, sed la plej gravajn vundojn ricevis la atakanto mem, kiu, pro pafo en la spino, restis paralizita en siaj kvar membroj, t.e. brakoj kaj gamboj.

Post tiuj okazintaĵoj, jura instanco ekigis proceson por pristudi kaj poste juĝi pri la ebla kulpeco de la atakanto. Ĝis tiam, li restos en malliberejo, kvankam verdire temas pri hospitala malliberejo, ĉar li ne povas moviĝi kaj li bezonas helpon por plenumi ĉiujn faktojn en sia vivo. El la sanitara vidpunkto, li estas konsiderata kiel



’ Ĉu la eŭtanazio povas nuligi la fundamentajn rajtojn de aliaj partioj en jura proceso?

tetraplegiulo , t.e. li suferas duoblan paraplegion. Krome,ekzistas neniu espero pri sana retrovo, ĉar li neniam povos movi la superajn aŭ la malsuperajn membrojn. Do, li rajtas postuli sian juron plifruigi sian morton, se li konsideras sian vivon kiel nedezirebla, t.e. li rajtas esti aplikita eŭtanazio rilate si mem. Oni devas scii, ke la hispana leĝaro tion permesas se iu konsideras, ke sia vivo estas tute ne-eltenebla, ĉar nepre li devas esti helpita por plenumi ĉiujn vivajn funkciojn. Do, unuavide li rajtis antaŭigi la momenton de sia morto, ĉu aktive aŭ pasive. Sendube eŭtanazio estus jure akceptata se li tion postulas.

Tamen, oni ne devas forgesi, ke antaŭ ol tiu postulo, oni malfermis juran proceson por pristudi kaj poste juĝi lian atakon al eks-laborkunuloj kaj al policistoj, kiuj ankaŭ suferis vundojn pro la pafado de la atakanto. Do, kio pleje gravas? Ĉu la rajto havi laŭvolan morton aŭ ĉu la rajto efektivigi justicon  al la viktimoj de la atakanto?

La viktimoj akceptas la eŭtanazion de la atakanto, ĉar temas pri ĉies fundamenta persona rajto, tamen ili petas, ke tiu rajto devus efektivigi post la okazigo de jura proceso. Tiel oni vidos unue, ĉu li estas kulpa aŭ ne. El tiuj akuzoj kaj ebla fina kondamno per juĝo, naskiĝos rajtoj de la viktimoj ricevi monan kompenson fare de la akuzito. Tamen, se li forpasas pro la aplikigo de eŭtanazio, la afero restos sen-juĝa, la atakanto neniam estus kulpa pri la vundoj kaŭzitaj, do, la viktimoj ricevus nenian kompenson.

Unuamomente, la juĝisto akceptis la peton de la akuzito efektivigi eŭtanazion. Tamen la aliaj partioj en la proceso apelaciis kaj ili petis unue la realigon de jura proceso.

Do, la afero ankoraŭ ne finiĝis. Kiel juristo, kion Vi opinias?

# *Vorto de la Semajno*

**Aŭdienco:** Oficiala akcepto de vizitanto aŭ petanto ĉe regnestro aŭ altrangulo

Tiuj kiuj deziras esti akceptitaj de tiu altrangulo "petas aŭdiencon ĉe altrangulo".
Se la altrangulo akceptas la viziton "la petanto ricevas aŭdiencon ĉe la altrangulo"

## RENKONTIĜO DE INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO EN MONTREALO

La Universala Kongreso de Esperanto okazos en Montrealo (Kanado) de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto. Verŝajne, dum ĝi okazos renkontiĝo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se vi estas membro de IJEA kaj vi planas ĉeesti la UK-on, bv. antaŭ-informi pri via preteco ĉeesti la renkontiĝon.

**jurista@esperanto.ac**